

PACO KAJ JUSTECO



ORGANO DE LA | ORGAAN VAN DE
NEŬTRALA ESPE- | NEUTRALE ESPE-
RANTO - MOVADO | RANTO - BEWEGING
BRUGGE



Organo der E^o-bewegung;
"Paco kaj Justeco" BRUGGE.

Voorzitter: Drs. F. ROOSE, J. & M. Sabbestraat, 12, BRUGGE.

Advertentie: Secretariaat: ROOSE-DE KERSGIETER,
J. & M. Sabbestraat, 12, BRUGGE.

Propaganda: Grégoire MARTENS, Nieuwstraat, 54, ASSEBROEK.

Postrekening nr: 479170 van DE KERSGIETER H.

J. & M. Sabbestraat, 12, BRUGGE.

La Kursgvidanto kaj la Kursanimo.

-EMBA-

La kurso komenciĝis same, kiel ĝenerale la kursoj kutimas komenciĝi. Sed ĝin gvidis ne s-ro Baghy, nek la metodfama pastro: la gvidanto estis nur samideano Benda, kiu, cetere, estis konvinkita pri sia alta talento kaj - kiel ni vidas - bonege konis la historion, literaturon kaj ĉiufankajn detalojn de la movado.

Li staris sur la estrado kaj klarigadis al la sciavidaj aliĝintoj, ke Esperanto jam estas oficiale akceptita mondlingvo: precipe en Germanio oni faras troege multe en la intereso de ĝia disvastigo; antaŭ nelonge oni konstruis tio grandan monumenton por ĝia eltrovinto Zamenhof; krom tio, la Gvidanto akceptis Heroldon de Esperanto kiel oficialan gazeton de la landa politiko. Dise en la tutmondo aperas tre multaj Esperanto-gazetoj. La preciza "AELA" eldonas la dumonatan Literaturan Mondon, kiu estas la suplemento de la SAT-revuo, kiu lasta subtenas sin per la heredaĵo de ADLÉU en Parizo. La Katolika Espero eldonas la revuon IRE, la Sonnaciulo eldonas "ISE" en Hungario, kie ISE estas tre favorata de la HESL. La PIRATO de nun aperas en la sankciita Abesinio. Krom tio aperas tre multaj libroj. Antaŭ nelonge verkis la fama verkisto Baghy la intiman romanon PARNASA GVIDLIBRO, kiun s-ro Kalocsay komentas kaj klarigas en aparta libro titolita VIKTIMOJ. Kaj Zamenhof jam antaŭ cent jaroj manifestis, ke Esperanto, pro sia interna ideo, nepre venkos tuj post la Ĝeneva Konferenco.

Tiu ĉi parolado de samideano Benda havis grandan sukceson. La gorkursanoj flame aplaudis. Precipe blonda knabino kun ruĝaj lipetoj admiris pleje samideanon Benda. Eĉ por momento ŝi ne turnis la okulojn for de la fama Esperanto-scienculo kaj profesoro, kiu, krom tio, estis bela kaj juna "knabo". Kiam je la fino samideano Benda anoncis, ke en la sekvanta horo li parolos larĝe pri la senco kaj esenco de la movado, la "ekesperantistoj" disiris kun plena entuziasmo.

+

La sekvantan tagon, samideano Benda iris promenpaŝe sur la bulverdo, kiam li subite estis salutata:

-Bonan tagon, samideano Benda!

Kontraŭ li staris la blonda knabino, kiu tiom admire lin rigardis hieraŭ vespere.

-Ĉu vi ne rekonas min? - Ŝi trilis ĉarme kaj varme.

-Ho, kion vi imagas pri mi, kara fraŭlino! Mi havas bonan memoron kaj mi tuj rekonas miajn kursanojn, precipe se ili estas tiel belaj kiel vi. La knabino ĉarme ekridetis.

-Kien vi iras? - Ŝi demandis intime iom poste.

-Promeni.

-Ankaŭ mi havas la saman intencion.

-Nu, ni iru do kune, - proponis s-ro Benda kun iom da instruita gravo.

-Ĉu vi scias, kion ni faru? Ni iru al la monto. Tie ni trovos ombrajn benkojn kaj vi bonvolos paroli pri Esperanto.

La interkonsento estis farita. Ili ekiris.

-Vi eĉ ne imagas, kiel mi ĝojas pri tiu ĉi renkonto - ĉerpis plu la ruĝaj lipoj. - Mi flamas de studemo kaj sciavido kaj min ege interesas ĉio, kio rilatas Esperanton. Ho, kiel mi dezirus paroli kiel vi kaj scii tiel multe pri la movado! Tiom da mirindaĵoj mi jam aŭdis pri Esperanto kaj mi ne estos trankvila, ĝis mi ellernos la lingvon plene. Oni diras, ke la kvara princo portis Esperanto-kravaton kaj la Negus Negesti sin razas per Esperanto-razilo. Ĉu?

Samideano Benda ja nenion legis pri ĉio ĉi en la Parnasa Gvidlibro (kvankam en tiu libro enestas ĉio, eĉ kio ne enestas en la SAT-vortaro, sed li pensis: se ekzistas Esperanta klango, kial ne ekzistus ankaŭ Esperanta kravato. Do, tre facile povis okazi, ke en la UEA-kongreso de 1935 en Romo, sinjoro Mussolini promesis, ke konkerinte Abesinion, li devigos la Negus-on, uzi Esperantan klingon. Kaj tio, ke la kvara princo favoris Esperanton, ĝusteas nenkompreneble.

-Kompreneble, fraŭlino, - li respondis vigle. Cetere, la plej gravaj kaj potencaj personoj favoras Esperanton. Ili parolas ĉiam tre favore por nia lingvo kaj movado. Bedaŭrinde, ili ankoraŭ ne ellernis la lingvon tiel perfekte kiel mi, sed tio ja estas komprenebla: ili ne havas tempon por tio. Ho, kara fraŭlino, vi eĉ ne imagas, kiel okupitaj estas tiuj gravaj personoj! Sed tamen, ili faras por Esperanto, kiom ili povas. Ekzemple la rusa caro, s-ro Stalin, pentrigis sur la naciajn standardojn la kvin-pintaĵajn stelojn; damaĝe estas nur, ke la pentristo ne sciis, ke nia stelo havas verdan koloron. Ankaŭ la ĉina imperiestro havas kelkajn silkvestojn kun nia insigno. Krome, se aperas Esperanta libro, li tuj presigas la du eldonojn, kion oni tre subtenas en kelkaj eminentaj rondoj japanaj. Unuven Esperanto estas tre-tre progresinta! Oni uzas ĝin ĉie kaj ĉie. Eĉ en milito ĉe Sturmoj, oni Esperante krias: "Hura!" Nur pretare mi mencias, ke s-ro Balthais, la fama verkisto, verkis romanon kun la sama titolo: "Hura! aŭ Ideoj de Faco".

-Belege, belege- krias la knabino. -Ho, kiel mi vin envias! Kiel deziregas scii tiel multe, kiel vi! - Ŝi flamis, sed poste malgajigis. -Ho, bo! se mi havas amikon tiel eminentan kia vi, kiel rapide mi progresu en la lingvo-sciio! La kurso ja nur rampas, rampas.

Tiuj vortoj flatis samideanon Benda. Ilia rigardo renkontiĝis. En kredo li komparis sin al sia edzino, kiu konstante grumbas pri lia esperantista agado.

Dume ili atingis la supron de la monto kaj sidiĝis sub komprenebla arbo. Kelkaj momentojn ili silente observadis.

-Mi volonte helpus vin- ekparolis samideano Benda.

-Ĉu vere? - ĝojis la knabino.

-Kial ne? Ĉu ne ĝuste por tio mi estas ja esperantisto, ke mi eku uku novajn adeptojn por la movado?

-Mi dankas! - ridetis la knabino kaj pliproksimiĝis al li tiel, ke ŝi unu sentis la varmon de la alia. La atmosfero iĝis streĉa.

-Mi dezirus, ke ni jam estu ĉe la fino de tiu ĉi kurso- parolis knabino kun facila ĝemo.

-Kial? Ĉu ĝi jam tudas vin?

-Ne, ne, ne, ne! - ŝi krietis. - Tute ne! Kontraŭe! Mi jam volus esti travivinta la tutan kurson kaj scii ĉion ekscieblan. Mi havas amikon, kiu tre bone parolas Esperante, ŝi ĉiam fanferonas, ke ŝi edziniĝis al la plej bona lernanto de la kurso, al ia komizo. Nu, mi diras tiam, ke tio ne estas tiel granda triumfo, kiel se ŝi estus edziniĝinta al la instruisto mem. Krome, ŝi rakontis ankaŭ tion, ke dank' al Esperanto jam estis multaj knabinoj edziniĝis: unu al franco, alia al finno, alia al serbo kaj ĉu vere?

-Jes, certe! Ŝi diris la veron! - pravigis samideano Benda. Aĉet la Enciklopedion; tie vi trovas amason da tiaj okazajoj, kvankam tio estas menciita apenaŭ la duono. Ekzemple mi havas konaton: ankaŭ li edziniĝis por Esperanto, eĉ jam eksedziniĝis brile kaj sukcese, kvankam tio ne enestas en la Enciklopedio, sed ne grave - enestas en la movado! Ankaŭ s-ro Bagh diris la saman. Ĉu vi scias, kiu li estas? Li estas la fama verkinto de "Verdkata Testamento" kaj "Streĉitaj Kordoj" kaj "Vortoj de Kamarado Dent" kiujn verkojn eldonis Raymond Schwartz en Parizo, per la helpo de SAT. Tio estas, kara! Esperanto estas tre progresinta! Jen estas tutaj Esperanto-milioj, ekzemple s-ro Bleier kaj...

-Interese, tre tre interese! - entuziasmis la knabino. - Kara samideano, vi nenion povus de mi peti, kio ajn ĝi estus, kion mi ne plenumu se vi promesus helpi min en la plej baldaŭ ellerno de la lingvo. Bonas estu mi la san... la sopiro fariĝi plej rapide esperantistino.

-Ho, kara, tre volonte mi faros tion! Plezuro mi instruos vin ekster la kurso. Ni interkonsentu pri la tempo. Ekzemple morgaŭ... ne, ne, postmorgaŭ vespere ni povos renkontiĝi kaj poste, ĉiun duan tagon. Ĉu bone?

-Bonege, bonege! Sed mi tre timas, ke mi ne povos ellerni...

-Eh, ne timu! Mi esperas, ke tiel inteligenta knabino, kia vi, lernu parolos jam post tri monatoj.

-Ĉu vere?

-Se vi dediĉos al la afero nur duonhoron tage, mia espero nepre realiĝos - li diris entuziasme. Sed poste, kvazaŭ pro subita rememoro, li rigardis sian horloĝon kaj saltleviĝis. -Ho kara, pardonu! Mi devas kuri al la stacidomo: mia edzino kaj filoto alvenos per la vagonaro de la oka.

La knabino aspektis kvazaŭ briko estus falinta sur ŝian kapon.

-Do, ĝis revido, postmorgaŭ vespere!

-Ho, ne, sinjoro! Subite mi konvinkiĝis, ke... jes, estus damaĝe pri la tempo. Esperanto neniam venkos. Adiaŭ!

Note de la redakcio:

LEA: Asocio de Esperantistoj Libro-amikoj.

SAT: Sennacia Asocio Tutmonda.

S A R E N E.

Heinrich Maun, la germana verkisto rakontas:

--Kiam ni estis 26-jara, ni vojaĝis al Parizo kun nei frakoj en pia poŝo. Kiel ĉiu juna verkisto, ankaŭ ni estis seĉvola pri la nokta vivo de Parizo, precipe pri la spaĉromantiko.

Poje ni estis atestanto de vera pariza epaĉhistorio. Ĝi finiĝis per homomorto. Venis la polico kaj ni ĉiuj devis iri al la gvardiejo. Kial nei, ankaŭ ni partoprenis la interbatigon. Mi defendis min, ĉar oni atakis min. Mia vesto ĉifoniĝis, mia vizaĝo estis sanga. Vene mi diris, ke mi estas germana verkisto, la oficiisto alridis min. Mi komencis krii, atesti mian veron kaj atingis, ke la policoficisto sendis policiston al mia loĝejo, ke mia mastro min legitimu. La policisto revenis, ke mi ne loĝas tie kaj la mastro ino min ne konas.

Mi konsterniĝis. La oficiisto ironic min alrigardis. Mi komencis klarigi, ke verŝajne la policisto eraris. Mi loĝas tie kaj tie, en la dua etaĝo, jam de monatoj kaj kiu havus intereson malpravigi tion. Mi parolis tion mult ke la oficiisto eksanceliĝis kaj post longa meditado denove sendis tien la policiston. Post dudek minutoj la bravulo revenis, kirante, ke mi ne trompa la policon, neniam mi loĝis tie kaj kiu povas scii, kia internacia fripono mi estas.

Mi vidis, ke la mistra bezato intervenis. Mi kaptis mian elokventecon kaj estas karakterize pri la kulturo de la franca policoficisto, ke fine li kredis al mi. Mi ne havis legitimilon, laŭ li eĉ ne loĝejon, sed ŝajne li eksentis la sincaron, radiantan el miaj vortoj. Matene je la sesa mi liberiĝis.

Mi hejmeniris, ĵetis min en la liton kaj rapide ekdormis, ke laŭeble tuj mi forgesu la nokton.

Tagmeze je la dekdua, kiel ĉiam, frapis mia mastreno. La enportis la matenmanĝon, ĉokoladon kaj frukton, poste alokutumis min kaj diris:

--Nokte dufoje serĉis vin la polico. Komprenoble, mi diris, ke vi ne loĝas ĉi tie...

el "Literatura Mondo" Majo-Junio 1946.

A M C.

-- Neratov --

El la rusa: Estera Szyndelman.

Estis serena, sunplena tago. Tramo rapide kuradis tra sonantaj reloj. En la tramo sidis civitano- Ljaŝkin kaj ridetis al la brilanta, blua neĝo.

Eksentinte ies rigardon, Ljaŝkin eklevis la okulojn. Lin persiste observis ĉarmega knabino en modeste, blanka peltmanteleto. La okuloj de la knabino estis klaraj kaj iomete mirantaj, kiel de infano.

Dolĉe ekĝemis la koro de Ljaŝkin.

"Ho, Dio mia!" - li ekpensis ĝoje, sed baldaŭ, ekmemorinte pri sia blua nazo kaj malgranda salajro, li ekhontis.

Li turnis sin al la fenestro kaj denove observis la blankan neĝon.

Sed la knabino rigardis plu persiste kaj stente.

Kaj denove ĝoje ekĝemis la koro de Ljaŝkin.

Dio, kia felico! - li ekpensis inspire.

Ĉu vere ... ano?

Igovkai! - ekkriis la konduktoro, malĉelike rompante la rozajn revojn. - Halbejo por bluej biletoj!

Ljaŝkin ĝemspiris, levis la kolumon kaj eliris. Eliris ankaŭ la knabino. Kaj denove, la trian fojon en la hodiaŭa tago, ekbatis tremante lia koro.

Aŭskultu, civitano! - diris subite la knabino per sonora, juna voĉo. -- Pardonu, sed al mi estas tre konata via vizaĝo!

Kvankam konate malnova, sed tre ĉarma maniero - ekpensis silente Ljaŝkin.

Mi estas preta servi al vi, sinjorino! - li respondis ĝentile, pretigante sin por aŭskulto.

Mi rekonis, mi rekonis! - ekkriis la knabino ĝoje. --La voĉon mi rekonis vi, civitano Ljaŝkin, pasintjare donis gladi al mia paĉjo kostumon kaj pantalonon, kaj tri rublojn por tio doni vi forgesis! Kaj eĉ la loĝejon vi forlasis tiam! Estas tre sankto de via flanko!

Ljaŝkin malheliĝis. Li elprenis la saketon, kalkulis en argento kaj en paperoj 2 rublojn 95 kopekojn, ŝovis ilin en la manon de la knabino kaj foriris.

Tede sonoraŝis la tremoj. Kaj stultege, brilanta neĝo dolorege pikis la okulojn.

el "Literatura Mondo" Jan.-Febr. 1936.

"Er is geen Duitse muziek, muziek is muziek." (Daürigo)

Graag had ik dit onderwerp meer uitgediept, want tenslotte bestaat ook muziek naar de Godsdienstige overtuiging, de sociale richting e.a. Plaatsgebrek belet het mij.

Voor belangstellenden kan ik o.a. volgende werkjes vermelden:

1. Beteekenis van de Muziek door Paul Collier.
Vorm en uitdrukking in de muziek. Met uitgebreide discografie.
Ive Basisreeks n°15. Uitgave Manteau Brussel (-1943-) 71 blz.
2. Geest en klank door Willem Pelemans.
Een inleiding tot verdieping van het Muzikaal genot.
Ive Basisreeks n°8. Uitgave Manteau Brussel (-1941-) 70 blz.
3. Het begrijpen van muziek door Maarten Dijk.
Een poging tot verdieping van het muziekgenot.
Pauo-serie NV.Uitg.Maatsch. Van Laghum Slaterus en Visser.
Arnhem -1931- 110 blz.
4. Mens en melodie door Wouter Paap.
Schijnwerpers n°47. Uitg. Het Spectrum Utrecht - 104 blz.
5. Muziek beluisteren door Willem Pelemans.
Uitgave L.J. Kujn Brussel -1932- 46 blz.

Fons Nooro.

NOTA: Wij wenschen na deze belangrijke bijdrage nu nog het volgende:
Zijn er geen drie leden die eens aandachtig Hooft's "Waronar",
"l'Avare" van Molière en "De koopman van Venetië" van W.Shakespeare
willen lezen en ons elk hun studie over de hoofdfiguur willen inzien-
den? Of is er zelfs niet één lid dat het van alle drie de werken wil
doen?

La ekesto de la ĉelscienco.

-H.De Kersgieter-

Ĉu vi scias ke daŭris jarcentoj entaŭ ol ni venis al la kono de la vivanta materio? Tio nur estis ebla depost kiam oni eltrovis la mikroskopo-
pon per kiu oni sufiĉe videble povis atingi pli grandigojn de malgrandaĵoj
kaj akiri eniŝpevan en la per la okuloj ne videbla konstruo de la vivanta
materio.

La unuan mikroskopo-
pon ni dankis al nia samlingvano Anthonie van Leeuwenhak (Delft 1632-1724). Li nem akri-
gis sian bensojn kaj malgraŭ la mal-
perfekteco de tiuj aparatoj, kaj la ne posedado de sufiĉe da helpmaterialo
li faris multajn observojn pro kiuj nun ankoraŭ ni admiras lin.

Granda paŝo estis farita de la Angla botanikisto Robert Hooke. En
1667 li publikigis unu serion da figuroj de malgrandaĵoj vivantaj estaĵoj an-
kaŭ de maldikaj tranĉoj de botelkorko kiujn li en aparta artikolo priskribis.

Li vidis ke la korko estas konstruita kiel mielĉelaro konsistanta el
malgrandaĵoj ĉambretoj al kiuj li donis la nomon ĉeloj (cellula-kamertjoo).

Tre baldaŭ estis trovataj de Leeuwenhoek kaj aliaj esploristoj la
samaj ĉambretoj en diversaj kreskaĵaj pecoj. En la morta korko Hooke nur
vidis la vandojn de la ĉambretoj. Dum la priserĉoj sur freŝa Materio, oni
venis al la konstato ke la ĉeloj estis plenaj je iu mukeca materio. Tiam
niere ekestis la unua ĉelkono en la botaniko. Kiel ĉefelemento, kiel la ver-
vivanta peco estis konsiderata la ĉelvando, ne la enhavo. Longan tempon oni
restis ĉe tiu opinio malgraŭ ke multaj novaj eltrovoj estis farataj kaj mal-
graŭ ke oni trovis en la ĉelenhavo unu apartan veziketon: la ĉelkerno.

La definitiva paŝo al la ĉelscienco ĉe la kreskaĵoj estis donata de
M.Schleiden ĉirkaŭ la jaroj 30 de la pasinta jarcento. Kaj proksimume sam-
tempe estis montrata de Th.Schwann, profesoro en Lieĝo, ke ankaŭ la best-
histoj estas konstruitaj el ĉeloj.

(daŭrigota)

Vlaamsche Esperantisten, uw blad is

F L A N D R A E S P E R A N T I S T O

uitgebreid, actueel, interessant, veelzijdig, goed ingelicht.

Uitgegeven door Flandra Esperanto-Instituut V.z.W.
Instelling voor Esperanto-Onderwijs & Propaganda.

Redactie & Administratie: P. Van Humbeekstraat, 3. BRUSSEL-WEST.

Losse nummers: 5 FR. Abonnement tot einde 1945 (8 Nrs) 36 FR.

Postrekening 3268.51 van F.E.I. BRUSSEL.

~~~~~

Jen la estraro.

Nia lasta numero de la kvara eldonjaro!

Tio signifas por ni, veteranoj de la redakcio, multege da laborhoroj; tio signifas por la propagandkaso grandegan malprofiton, kaj signifas plue tri danĝerplenajn jarojn en la okupata Belgando, ĉar nia revuo estis malpermesita!

Sed malgraŭ tio, la gvidantaro de la revuo, kune kun la estraro de la grupo, ne unu momenton pripensis la ĉesigon de la eldonajo. Kontraŭe, en la estonta jaro, ni klopodas disvastigi la revuon en la tuta mondo tiel ke ĝi iĝos vere internacia. Por nia grupo, tre interesa iĝos la interŝanĝmetodo, per kiu la grupo ricevos revuojn kaj esperantoĵojn el la tutmondo. Oni povas jam promesi ke la enhavo pliboniĝos ĉar la kunlaborantaro konstante kreskas. Ĝis nun la enhavo estis dulingva, sed tio haltiĝos, ĉar por la fremdlingvanoj nur la en Esperanto skribitaj artikoloj ekinteresos.

La redakcio nur esperas ke ĉiuj malnovaj abonantoj restos fidelaj kaj ke ili plu helpas disvastigi la legantaron.

Por la estraro,  
Maertens G.

Tiun-ĉi nomon, la estraro havas la ĝojegan taskon gratuli jenajn aktivajn membrojn de la grupo pro ilia naskiĝtagreveno:

- 1. Fraŭlino Mallet Germaine, fidela kunlaborantino kaj membrino de "Retorikĉambro" naskita la 12-11-23.
- 2. Fraŭlo Deduytsche Charles, nova membro, ablo nia estonta propagandisto, ĉar li portas ĉiam la verdan stelon, naskita la 19-11-27.

aaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaa  
 aa                Jen nia lasta numero de la kvara eldonjaro!                            aa  
 aa                                                                                                   aa  
 aa                                                                                                   aa  
 aa                "Face kaj Justeco"                                                                aa  
 aa                                                                                                   aa  
 aa                                                                                                   aa  
 aa                La abonprezo estas vera tiel malalta ke vi preskaŭ ricevos nian           aa  
 aa                revuon senpage! Pagu tuj 25 frankojn al nia propagandoservo aŭ            aa  
 aa                sendu la kotizon al poŝtĉeko 291429 de Maertens Grégoire, Nieuw-            aa  
 aa                straat 54, Assebroek! Verbu novajn abonantojn, vi ricevos belegan            aa  
 aa                premion!                                                                                            aa  
 aa                                                                                                   aa  
 aa                                                                                                   aa  
 aaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaaa

Al la leganto.

Ĉu vi trovis nian revuon interesa? Ni tute sincere demandas kaj ni deziras vian tute sinceran respondon. Laŭ nia opinio, ĝi estis interesa. Laŭ nia opinio, ĝi plenumas la kondiĉojn kiujn revuo devas plezumi por esti interesa. Ĝi estas varia. Ni havas konkursejn, ŝercojn, sciigojn pri la movado, kritikojn, artikolojn pri la diversaj fakoj de la scienco. Ni havas artikolojn pri la ideologio de nia movado. Kaj la graveco de tio estas tre kaj tre granda! Ni ja havas grandan edukon taskon je tiuj kiuj venas en nia movado.

Al la nekredanta kaj skeptika amasego ni devas montri la eblecojn de Esperanto kaj ni devas montri novan, alian vojon kiu - se oni laciros ĝin - kondukos al pli bela mondo, kaj kiu certe faros nian grandan fruilion pli bela se ni enpraktikigas la internan ideon.

Al la nevidata, perdiĝanta junularo ni devas doni idealon, racio fundamentitan idealon.

Eble vi trovas ke ĉiu nuneto ne donas sufiĉe? Tio nur okazas pro la fakto ke ni devas havi pli da abonoj por pligrandigi nian revuon. Ju pli da abonantoj, des pli ampleksa kaj multenhava ĝi estos.

Ni tamen konstante, jes malrapide, sed des pli fortike kreskas.

Viva Esperanto!

# GRUPA VIVADO

Dum la lastaj semajnoj ni ĉiuj estis sub la impreso de tre grava konflikto kiu rabis al nia grupo kvar tre kapablajn geesperantistojn, kaj unu alian pri kiu tiuj kiaj konas lin sentas kompaton. Tia kvinopo tamen ne estas fortika roko. Du el ili estas fakte malemikaj al la tri aliaj sed en la batalo kontraŭ la prezidento ili staris sur komuna batalfronto. La du ĉefaj personoj forĵetis la idealon kiun ili antaŭe karesis kaj nun atakas la plej esencajn principojn de nia grupo "Paŭl kaj Justeco". Kontraŭe al antaŭa konduto, laŭ ili, nia grupo ne plu devas esti "elite" kaj la membroj ne plu devas havi morale altstaran vivon. Nia grupo devas verbi ĉiujn... kaj ĉiajn. Kaj la morale konduto... estas la tute kaj tute privata. Tiel ni devas kompreni alian publikan leteron. Aliflanke ni tamen spertis ke ili klopodis ataki ĉefe la prezidenton. Konflikto kiu jam de longe estis "latenta" nun iĝis, iam devis iĝi "patenta". Ne sen korporemo ĉio tio okazas... kaj ankoraŭ ĉiam oni esperas... ĉar oni tiel longtempe esperas kiel longtempe oni vivas.

La vintro alproksimiĝas kiu estas la plej granda danĝero por multo-opa kunveno. Niaj gemembroj tamen memoru ke la ĉiusemajna laborkunveno estas la nepre necesa kaj plej grava tasko de ni. Ili konvinkigu ke nur gravaj motivoj donas rajton malĉeesti ĝin... kaj ili ne lasu ĉiun multegan laboron al nur kelkaj.

Nu! Lasu min en unu fojo finpreni la nigran flankon de nia grupa vivado. Ni, ĝis nun, ne ankoraŭ sukcesis trovi tian familian rondon kiam ni travis dum la milito. Estas vere ke multaj malsukcesoj trafas nin koncerne ĉiujn ejon k.t.p. Ni tamen venkos ankau ĉi-tion baron kiel ni venkis antaŭajn pli gravajn. Pli ol iam antaŭe nia grupo devas esti "elite" kaj ni fidus je la "idealistoj".

Nia prezidento faris du paroladojn pri la historio de la mondlingva movado. Precipe la alra lukto inter Esperanto kaj Ido estigas nun ridon kaj gajecon. Al la relativaj genovuloj ni ankau konigis kelkajn principajn artikolojn kiuj pli frue aperis en nia revuo kaj kiuj formas la bazon de nia ideologio. Ankau la riĉan enhavon de nia biblioteko ni konigis. S-ano kaj ĉefesperanto por I.J.O. Carlo Braet faris paroladon pri I.E.L.

La Sept.-Oktobra numero de "Amerika Esperantisto" per longa artikolo konigas al la tuta mondo nian gloran agadon dum la germana subpremo. Vere, ĉi post nun la admirantaĵoj okuloj de ĉiuj estas fiksitaj al ni. Tio donasoble agadon senton sed tio metas sur niajn ŝultrojn pezegon ŝarĝon. Ni devas esti subtenkolono de la Esperantismo. Ĉio tio venas de ni devas esti perfekta. Dum ĉio ni devas esti. Ni konsciu tion bone.

La Redakcio.

## Belgaj pri k.

Wie wenscht opgenomen te worden in het Internationaal Katholiek Esperantistenadresboek, zĳnde vóór 15 Dec. e.k. aan, adres, beroep, telefoon nr., functie in de beweging + 2 intern. responduponoj naar:

Lorena Chauvignat, Caece de hlaneona  
DUNDROLA - DUBLIN. IRLANDO.

Dan kriĝt je miteen dit boek det zal verschijnen op 1 Jan. 1946.raag aan zelfde adres proefnummer van het blad "Irlando Vokas".

## Angulo de la serĉeruloj.

De la enigmo en la Oktobra numero ni ricevis bonan solvon de: E-inoj Marie-Thérèse Rocco, Germaine Pallet kaj de Sinjoroj Grégoire Maerens, Gilbert Bruynel, A. Spruytte kaj Etienne De Baets. S-ano Isidorant devas nur unu eraron. La vorto por signifi ekstrema devas esti "last" kaj ne "vast". Ni scias ke li disponis pri nur kelkaj minutoj por fari ĝin kaj de eraro ekstis verŝajne pro rapido. Alia enigmo an venanta tre baldaŭ venonta numero.